# Dansk ESPERANTO-BLAD

UDGIVET AF
ESPERANTIST-
FORENINGEN
FOR
DANMARK

★

ELDONATA DE
CENTRA DANA
ESPERANTISTA
LIGO

★

30. ÅRG.
SEPTEMBER
NUMMER

9



La granda korto de la kongresejo en Mainz.

**DANSK ESPERANTO-BLAD**

udkommer den 15. i hver måned.
Stof må være redaktøren i hænde senest den 25. i den foregående måned.

Redaktør: *Ole Nederland*,
Primulavej 61, III, Odense.

Ekspedition: *Arne Kolle*,
Landlystvej 48, Silkeborg.

Postkonto 57274.

Abonnement: 8 kr. pr. år.
Eksterlanda jarabono 8 d. kr. aŭ 14 respondkuponoj aŭ 16 U. L.-steloj.

## La unuapaĝa bildo

*montras la oficialan bonvenigon de la esperantistoj al la sukcesa U. K. en Mainz, kie ĉ. 2000 E.-parolantoj ĉeestis.*

*Starante sur la balkono la ĉefurbestro de Mainz, Franz Stein, oficiale bonvenigante la kongresanojn. Apud li staras la prezidanto de UEA, profesoro Canuto, kiu poste dankis pro la eksterordinare esperantista akcepto flanke de la ges-roj Stein, kiuj ambaŭ laboris en la Loka Kongresa Komitato, ne nur honore, sed kiel esperantistoj.*

---

## Ernst Egholm

membro de Aabyhøj Esperanto-Forening, mortis la 27/8, nur 2 semajnojn post sia reveno el UK en Mainz. Jam en decembro li malsaniĝis kaj kuŝadis longe en hospitalo. Li resaniĝis tiom, ke li povis partopreni la kongreson kaj tre ĝuis ĝin. — Lia forpaso estos granda perdo por nia loka klubo. Ni profunde kunsentas kun s-ino Egholm kaj la infanoj.

Honoro je lia memoro! *LF.*

---



## D. E. F. meddeler:

at de internationale feriekursus i Helsingør havde samlet godt 70 deltagere fra 10 forskellige lande. Det blev en enestående dejlig uge.

at katalog-nummer 827 ikke har meldt sig endnu. Vi forlænger hermed fristen til efteråret, så ejeren kan få et gratis kursusophold på Idrætsskolen i Vejle 19.—26. 10.

at alle vore 4 sommerture blev særdeles vellykkede. Ca. 125 personer deltog, de fleste fra Danmark.

at der blev optaget farvefilm på alle ture. De vises først ved karavanefesterne, derefter i alle Esp-klubber, der måtte ønske det. Karavanefesten i København afholdes søndag d. 21/9 kl. 19 i Sct. Andreas Ordenens selskabslokaler, Frederiksberg Allé 11. I Vejle afholdes den lørdag den 18/10 kl. 18,30 på Idrætsskolen. Alle rejsefæller fra i sommer og tidligere år, samt andre interesserede, er hjerteligt velkomne.

at vore internationale efterårs-feriekursus 19.—26. oktober afholdes på Den jyske Idrætshøjskole, der lige er blevet udvidet og moderniseret for ca. 3 mill. kr. Skønnere og mere velegnet sted kan næppe tænkes. Også De bør komme for at deltage, enten det bliver i begynderholdet, eller i Konversacia, Perfektiga eller Pedagogia kursoj. Skriv til undertegnede efter program og giv Dem selv den kursusuge. Det er en god gerning!

*L. FRIIS,*
*Ingemannsvej 9,*
*Aabyhøj.*

# Prominentuloj rekomendas lernadon de Esperanto

Meze de septembro CDEL elsendos alvokon al la dana loĝantaro lerni Esperanton. La alvokon subskribis: *Bomholt, Keld Friis, Harald Grønborg, Poul Hansen*, Svendborg, *Stig Hansen, Piet Hein, Jørgen Jørgensen* (la instruministro), *Viggo Kampmann, J. O. Krag, Mogens Lichtenberg, Kai Lindberg, Miskov Makwarth, Søren Olesen, Kaj Rosenberg*, viclernejestro *Otto V. Nielsen* kaj *Erik Eriksen.*

La teksto de la alvoko estas jena:

**I 50-året for Esperantistforeningen for Danmarks beståen påtænkes et fremstød for udbredelsen af det internationale sprog ESPERANTO. I den anledning vil vi gerne opfordre den danske befolkning til at indmelde sig til et af de mange kursus, der i den kommende kursussæson under aftenskoleloven påbegyndes rundt om i landet.**

En cirkulero de CDEL, elsendita al la kluboj okaze de tiu alvoko, troviĝas la sekvantaj tre gravaj komentoj:

*La alvoko sendube vekos grandan atenton pro la fameco de la subskribintoj, kaj ni tial esperas pri bona priparolo en la gazetaro kaj en la radio. La alvoko verŝajne estos tre forta stimulilo por la danoj lerni Esperanton, sed por eviti, ke ĝi nur fariĝos bato en la aero, ni atendas, ke niaj kluboj kaj izoluloj faros konvenajn paŝojn por eluzi la situacion.*

*Se vi jam decidis aranĝi kursojn, estu pretaj eventuale pligrandigi la nombron de ili. Se vi ne decidis aranĝi, pripensu, ĉu la tempo tamen ne venis por fari Esperanto-kursojn. Estu pretaj por — kiam vi aŭdos la alvokon en la radio — tuj telefoni al ĉiuj lokaj taĝurnaloj por diri, ke okaze de la alvoko vi volas informi, ke en via loko komenciĝos Esperanto-kurso je tiu tago, je tiu horo, en tiu loko (indiku precize), kaj ke la prezo estas tiom. Ankaŭ petu la gazetojn skribi, ke ĉiuj interesatoj povas ricevi ĉiujn informojn pri Esperanto ĉe tiu persono kaj adreso (se eble ĉe persono kun telefono). Havu stokon da „Verden bliver mindre og mindre" preta por sendi al interesatoj, kaj zorge notu ilian nomon kaj adreson por poste fari personan propagandon al ili. Enmetu pagitajn anoncojn en la lokajn taĝurnalojn pri viaj kursoj. Se estos tute neeble por vi aranĝi kurson, informu la gazetojn kaj interesatojn pri la koresponda kurso de CDEL (adreso: G. Rasmussen, Lindøvej 2, Bogense, prezo: 15 kr. por 10 lecionoj; provleciono estas senpage havebla).*

---

# Radioprelego

*pri lingvaj problemoj.*

La dana radio baldaŭ — verŝajne en septembro — elsendos prelegon (danlingvan) kun la titolo „Sprogproblemer". La prelegonto, s-ro *Dragsted*, informas, ke la vorto Esperanto ludas nur malgrandan rolon en la prelego; ĝi ekz. tute ne estos menciata dum la unua duono de la elsendo. Ni tamen certe ne eraras supozante, ke la prelego meritas nian tre grandan atenton. Ne forgesu post aŭskultado danki la radion.

---

SAARBRÜCKEN, Sarlando, eldonis gvidfolion en Esp. pri la urbo. Senpage ricevebla ĉe s-ro *Jakob Schenkel*, Am Ziegelhof 30, Neu-Aschbach/Saar, Post Klarenthal, Germanujo.

# Por la kluboj

*

## S-ino Renee C. Christiansen

kiu alvenis al Danujo en majo kaj tuj post sia alveno trafikakcidentis kaj poste pasigis monatojn en la malsanulejo en Gentofte, sciigis al mi, ke ŝi nun fartas bone; tamen ŝi ankoraŭ ne estas tute resaniĝinta. Ŝi petas, ke la kluboj pardonu, ke tio malebligis ŝian planitan vojaĝon kaj la vizitojn en niaj kluboj, sed se estas eble, ŝi volonte poste faros tiujn vizitojn en la aŭtuno. Ŝi cetere petas min esprimi ŝian elkoran dankon al tiuj gesamideanoj, kiuj vizitis ŝin dum ŝia restado en la malsanulejo kaj tiel donis al ŝi la impreson de vere esperantista animo.

18 kluboj esprimis deziron pri vizito de s-ino Christiansen, kaj mi petas, ke tiuj kluboj iomete paciencu ĝis kiam ili ricevis pliajn informojn.

*Leo Søgaard-Hansen.*

*

## Magnetofona servo de UEA

nun posedas jenajn sonbendojn:

*Auld:* *„La nuntempa E.-literaturo* (30 min.), *Lapenna:* *„La laboroj de UNESCO por interkonigo de popoloj“* (45 min.), *Waringhien:* *„Pri la Loire Civilizacio“* (30 min.), *Watier:* *„Atomenergio kaj aŭtomatigo“* (40 min.), *Albault:* *„La problemo de la malsato en la mondo“* (40 min.), *Thorsen:* *„Tri nobelpremiitoj en dana literaturo“* (45 min.), *Thorsen:* *„12 poemoj el Rozoj kaj Urtikoj“* (30 min.), *Diskutoj kaj voĉdonado pri Esperanto dum la ferma kunsido de la VIII-a Ĝenerala Konferenco de UNESCO en Montevideo (10 min.).* — Adreso: R. Eichholz, Esp. Press, Oakville, Ont., Kanado.


**AGRABLAN SURPRIZON**

*vi havos kvin fojojn dum la jaro se vi abonas la revuon*

*Norda Prismo*

*la socia, kultura kaj literatura revuo. Redaktoro: F. Szilàgyi. Redakcia komitato: B. Ragnarsson, Islando. H. Rosbach, Norvegujo. V. Setälä, Finnlando. P. Thorsen, Danlando.*

*Abonprezo: 10,00 sv. kr. Abonu per nia poŝtĉeka konto: 15 54 80, aŭ ĉe via landa libroservo. Specimenon kontraŭ 2 respondkuponoj.*

*Norda Prismo,*
*Barnhusgatan 8,*
*Stokholmo.*


*

## Por la klubprogramo ne forgesu

vesperon, en kiu vi festos la 10-jaran datrevenon de la akcepto de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj la 10-an de decembro. En la „Informaj Centroj“ de UN estas havigeblaj abundaj materialoj. Adreso de la dana centro: FN's Informationskontor, H. C. Andersens Boulevard 37, København V.

Per tiaj festoj la Esp.-parolantoj ankoraŭfoje havos la okazon montri sian organizitecon kaj forton kaj tiel fortigi la pozicion de Esperanto ĉe U. N., UNESCO kaj aliaj gravaj organizaĵoj.

*

## MEMORU

la novajn reklamglumarkojn (prezo 75 øre + afranko por unu folio) kaj la afiŝojn kaj broŝurojn! — Aĉetu ĉe la afergvidanto de CDEL, *L. Kromann Jensen,* Algade 11, Nykøbing Sj.

*

## Deziras korespondi.

35-jara librotenisto el Hungarujo, 21-jara latvo, 21-jara portugalino kaj ĉ. deko da aliaj. La adresoj haveblaj per la redakcio.

*

KOLORAJ LUMBILDOJ pri la ĉijara UK inkl. de la Infana Kongreseto kaj pri la TEJO-kongreso estas disponigeblaj de *K. E. Salzmann,* Frankfurt/M, Germanujo. — S-ro S. petas ĉiujn, kiuj diapozitive fotografis dum la nomitaj kongresoj, interrilati kun li.

# LA KURSOJ EN HELSINGØR 1958



*70—80 partoprenantoj el 10 diversaj nacioj ĉeestis kaj havis ĝuindan semajnon.*

---

## Letero de la ekzamen-komisiono

Dum la semajno 19/10—26/10 1958 okazos en Vejle instrukcia kurso por gvidantoj de Esperanto-instruado al infanoj.

Multaj instruistoj certe deziras aranĝi instruadon pri Esperanto en siaj lernejoj, sed sentas, ke mankas al ili plano kaj ideoj por tia instruado.

La kurso en Vejle helpos vin, kaj ne nur oni donos la teoriojn kaj la ideojn, sed se vi tion deziras, vi ankaŭ havos okazon praktiki instruadon al klaseto da infanoj, kiuj ĉeestos.

La Dana Esperanto-Ekzamenkomisiono varme rekomendas, ke multaj partoprenu la kurson en Vejle. Jam pluraj lernejoj havas Esperanto-instruadon, sed ni bezonas vastan partoprenon en la instrua laboro por konvinki la aŭtoritatojn pri la indeco de oficiala Esperanto-instruado en danaj lernejoj.

Por la komisiono

*Leo Søgaard-Hansen,*
prezidanto.

— — —

En rilato al la supre menciita instrukcia kurso ni denove atentigas pri la indeco de onkliĝoj (vd. la antaŭan numeron!). Estas substrekinde, ke la ebleco, kiu prefere ekzistu, por ke la partoprenantoj povu praktiki antaŭ klaseto da infanoj, estas tre grava por la sukceso. Onkliĝo por unu el la infanoj kostas 75 kr. (= la duona sumon de la restado). La kluboj bonvolu pripensi, ĉu ili povas helpi. —

Adreso por enpago de la monsubtenoj estas *Ole Nederland*, Primulavej 61 III, Odense.

## *La fulmtrajno*

S-RO ESKIL SVANE, kiu nuntempe loĝas en Novjorko, kie li havas laboron en la jura fako de UN, komencis E.-kurson tie. La nombro de partoprenantoj la unuan vesperon estis 35, kaj laŭtakse 20—25 el ili daŭrigos ĝisfine. Eskil Svane kaj la du esperantistoj *Kersaudy* el Francujo kaj *Piron* el Belgujo, kiuj ankaŭ laboras en fako de UN, estas sufiĉe optimismaj pri posta starigo de UN-Esperanto-klubo.

S-INO HAUDEBINE, kiu dum multaj jaroj faris Esperanto-instruadon en nia lando, en oktobro vojaĝos al New Delhi en Hindujo, kie ŝi daŭrigos la laboron por Esperanto, kiun komencis Tibor Sekelj.

EXON JOURNALEN estas baldaŭ ekaperonta organo de Internacia Klubo Por Korespondado Kaj Interŝanĝo el Landskrona, Svedujo. Anoncoj en E. pri korespondo kaj interŝanĝo, poŝtstampitaj antaŭ 1/12 ĉ. j., aperos senkoste.

---

### Subtenantoj de CDEL 1958.

| | |
|---|---|
| Stato la 25-an de julio | 1015 kr. |
| S-ro A. H. Wendel, Rødovre | 15 kr. |
| Stato, la 25-an de aŭg. 1958 | 1030 kr. |

Plej koran dankon! — La subtenanto-kotizojn oni enpagas al ĝirokonto 57 370, CDEL, Algade 11, Nykøbing Sj.

*L. E. Kromann Jensen.*

## Novaj libroj

*

*Verna Hills:*

**Alko kaj Suna en siaj du dometoj.**

Trad. de Rüdiger Eichholz. eld. de Esp. Press, Oakville, Ontario, Kanado. 78 paĝoj, formato 14× 21 cm, kun 21 tutpaĝaj, diverskoloraj ilustraĵoj, bindita per moderna plasta ligilo. Prezo: ĉ. 6,60 kr.

Rüdiger Eichholz persiste kaj laŭdinde daŭrigas sian eldonadon de infanliteraturo. — Prave li abomenas la ofte tre kruelajn fabelojn ekz. de Grimm, kaj jen li trovis usonan rakonton (por 3—4 jaraĝaj) pri du geknaboj kiuj travivas tute ordinarajn aferojn, sed priskribitajn en maniero kiu plaĉas al infanoj.

Tiu maniero manipulas per stilo, kies ĉefaj ecoj estas: mallongaj frazoj, ripetato de la ĉefvortoj kaj simpla vortprovizo. Ekz: „Alko sonĝis. En sia sonĝo Alko ne kuŝas en sia lito, la mallumo ne ĉie ĉirkaŭas lin. En sia sonĝo Alko faras aliajn aferojn . . .“.

Rimarkinda estas la ideo de la tradukinto, ke oni devas krei por Esperanto tute apartajn voknomojn. Laŭ lia propra invento estiĝis la nomoj Alko, Suna, Mola, Stopla.

Ankoraŭfoje estas ripetinde, ke la bezono pri infanliteraturo en Esperanto estas granda; ankaŭ tial tiu ĉi libro estas bonvena.

*Svend Dragsted:* **ESPERANTO GRAMMATIK**

Heftet: Kr. 4,50
Indbundet: Kr. 6,50
Uundværlig for danske esperantister

***Fås hos klubbernes bogsælgere eller hos CDEL's Libro-servo***

## Esperanto Press

nun eldonis ankaŭ Oran Libreton n-ron 5, „*Bienbestaj amikoj*" (ĉ. 6 kr.). Krome aperis ĉiujara *murkalendaro* (ĉ. 4,25 kr.) kun 16 paĝoj da helflava kartono en formato 29,5 × 21 cm, parte dukolore surpresitaj. — Fiksante diversajn semajntagajn slipojn sub la kalendaron oni povas uzi ĝin ĉiujare. La supraj partoj de la monatoj estas liberaj, por ke oni povu ornami ilin per bildkartoj k. s.

*

*Rudolf Rakuŝa:*

## Instrumetodo por Esperanto

Eld. de Slovenia Esp.-Ligo, Ljubljana, Jugoslavujo, 100 paĝoj, kajera. Prezo nekonata.

Tiu libro turnas sin al ĉiuj kiuj instruas pri Esperanto, kaj ĝi verŝajne estas la sola ekzistanta en sia speco, kiu plenamplekse pridebatas ĉiujn problemojn, kiuj altrudas sin al la Esp.-instruanto.

Post precizigo de la diferencoj inter la instruado pri naciaj lingvoj kaj E., detale pritraktiĝas la unuopaj instrukategorioj kaj aplikado de instrumetodo.

Speciale atentinda estas la ĉapitro pri instruhelpiloj; pripensinda la akcento, ke mankas iu internacie redaktita lerngazeto, en kiu trovus la vizitanto de la daŭriga kaj supera kursoj konvenan studmaterialon, legaĵojn, amuzaĵojn ktp.

Jen la ideala gvidlibro pri la metodiko de la E.-instruado.

*

A Supplement to the

## Esperanto-English Dictionary

*of Millidge.* Eld. en Novjorko 1957 fare de The British Esperanto Association. Prezo: ĉ. 1,50 kr.

*

## Ili havas ĉion komuna

Resumo pri la labormaniero de la bruderhofanoj. Eldonis: La Societo de Gefratoj, Bromdon, Bridgnorth, Shropshire, Anglujo.


# Undervisningsmateriale, etc.

| | |
|---|---|
| Langgaards Lærebog | kr. 4,50 |
| Friis' Lærebog | „ 4,50 |
| Sub la verda standardo I | „ 2,00 |
| Sub la verda standardo II | „ 4,25 |
| Neergaards Lærebog for Begyndere | „ 2,00 |
| Progresu | „ 8,00 |
| Bagatelaro | „ 7,50 |
| Esperanto for Begyndere I & II | „ 3,00 |
| Esperanto for Børn | „ 2,75 |
| La forto de l'vero | „ 4,00 |
| Grønne ordbøger | „ 4,00 |
| Friis: Esperanto - Dansk | „ 4,50 |
| Grønborg: Dansk-Esperanto ordbog, indb. | „ 17,00 |
| Plena vortaro | „ 21,00 |

Endvidere leveres skriveblokke, slipseholdere, emblemer, kuverter, nøgler, lommebøger etc.

**LIBRO-SERVO**

*v/ A. H. Wendel, Hviddingvej 52, Rødovre.*

# HEROLDO
## DE ESPERANTO

*Duonmonata internacia organo de la Esperanto-movado*

**Prezoj en 1958**

| | |
|---|---|
| Abono tutjara .......... | kr. 22,00 |
| Abono julio-decembro .. | kr. 10,00 |
| Anonceto ĝis 25 vortoj .. | kr. 3,50 |
| Anonceto 26 ĝis 50 vortoj | kr. 7,00 |
| Anonco pokvadratcentimetre | 0,60 |

*Pri HEROLDO-libroj petu libroliston*

**Dana peranto**

S-ino G. JAKOBSEN
Carit Etlarsvej 14,
Aabyhøj.
Poŝtkonto 54133.



# FOTO
## Aftryk

til meget fordelagtige priser. Således kun 26 øre for et 6 × 9. Ved 8 stk. og derover af samme negativ kun 22 øre pr. stk.

**Forlang prisliste!**

Mange års erfaring med forsendelsesforretning. Garanti for omhyggelig udført arbejde.

**Nia Foto,**
*Bjerringbro st.*
v/Henning Nielsen,

Telf. 357.
Giro 66122.


## ORA FIŜO

Bild-teatro por infanoj de la mondo, eld. de Amo-Akademio, Tenmori, Kozoĵi, Aiĉiken, Japanujo. Prezo: 8 resp. kup. + sendkostoj.

La „teatro“ konsistas el 10 kartonaj tabuloj kun desegnaĵoj (al malgrandaj infanoj tre konvenstilaj) kiuj ilustras fabelon pri la ora fiŝo. La teksto troviĝas dorsflanke, kio permesas la voĉleganton samtempe montri la bildojn kaj legi.

*

BULTENO GEPATRA nun aperas presita kaj daŭre enhavas multajn bonajn materialon kaj konsilojn por gepatroj de denaskaj Esperanto-parolantoj. Eldono: Esperanto Press, Oakville, Ontario, Kanado.


# DANSK VEGETARISK FORENING

**varetager vegetarernes fællesinteresser. Der kræves intet løfte af medlemmerne. Kontingent 7 kr. årligt. Ægtepar 8 kr., *inkl.* abonnement på VEGETARISK TIDSSKRIFT. Forlang gratis prøvenummer. Adresse: Ågade 114, II, København N. Telefon: Gothåb 1163 u.**



**Ni rekomendas al Esperantistoj**

restadon en nia unuaklasa hotelo. — Esperanto parolata.

*HOTEL DANIA*, Silkeborg. Tlf. 6 - 7 - 686.



Esperanto-BOGTRYK

**Indhent tilbud gratis og uden forbindende hos Sønderjyllands ældste og største bogtrykkeri —**

MODERSMAALETS Trykkeri

**Haderslev — Telefon 22031**



A-S Modersmaalets Trykkeri - Haderslev